

Hodiaŭa ekskurso: la Akvario Birch

La belega akvario Birch troviĝas proksimume 1.7 mejlojn (2.7 km) sude de la universitato; unue ni marŝos piede por trafi buson #30, kiu estas senpaga por studentoj. Ĉe la akvario la enirkosto por ni estas po \$7.50.

Ne forgesu kunporti vian identeco-karton, kaj ankaŭ vian fotilon, se vi havas. Ni renkontiĝos antaŭ Asante je 1:45. Bonvolu veni ĝustatempe, ĉar ni ne povos atendi longe.

Dekstre: Emilija GJURCINOVSKA, lernanto en NASK 2007, rigardas fiŝojn ĉe la akvario.



Gvidu programon!

Krom ekskursi, dum la posttagmezoj kaj vesperoj ni prezentos diversajn programojn pri temoj elektitaj de vi. Programoj ne devas esti komplikaj aŭ longaj aferoj; sufiĉas nur 30-minuta parolado pri iu ajn temo, kiu interesas vin.

Dum antaŭaj jaroj oni prezentis ĝuindajn programojn pri eksterlandaj vojaĝoj, hejmurboj kaj hejmlandoj, ludoj, hobiaj, literaturo (ĉu litera-turo?), trezorserĉado, kaj kulturaj eventoj kiel dancado, muzikado, kaj kantado.

Mi kuraĝigas vin gvidi posttagmezan aŭ vesperan programon. Bonvolu kontakti min por proponi ideojn aŭ peti helpon!

—Hoss

Redaktoraj notoj pri la lasta numero de la *Fasko*...

★ Ni raportis pri la *Friends Resale Center*, malmultekosta butikoj ĉe la Internacia Centro. Bedaŭrinde en la paĝaro de la butikoj mankas informo pri la somera horaro. Laŭ informo de Ellen, la butikoj estas malfermita de lundo ĝis ĵaŭdo inter 10:00–2:00. (Dankon, Ellen!)

★ Kelkaj legantoj maltrankviliĝis pro mencio de danĝeraj bestoj en artikolo pri “eks-ursoj” ĉe UCSD. Tamen ne timu: temas pri nur simpla tajp-eraro de “ekskurso”. Efektive, neniu eks-ursoj vagas la kampuson; vi trovos nur verajn, malsatajn ursojn kun akraj dentegoj.

La misteroj multobliĝas...

[De la redaktoro: antaŭ mia pordo hieraŭ vespere mi trovis paperpeceton kun la sekvaĵa strofo. Ĉu alia verko de Aĉjo?]

Malproksime li rigardas
belulinon ege ĉarman,
tamen mankas al li multe da kuraĝo.

Tro intime li sin gardas,
drinkas vinon aĉe varman,
diojn dankas malgraŭ veno al malsaĝo.

Fuŝo rime avangardas,
donas finon ne tre larman;
Temo flankas (avantaĝe?) el la paĝo
nur ĝislime

[kaj ĝuste tie la papero estis ŝirita...]

El la kalendaro

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝos ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj restas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>


	hodiaŭ	vendredo	sabato	dimanĉo
matene	9 atm–12:20 ptm: klasoj	<i>Nacia TAGO: neniuj klasoj!</i>		
post-tagmeze	1:45 ptm: ekskurso al la akvario <i>Birch</i>	<i>libera</i>	<i>Diversaj eblecoj: Vidu malsupre...</i>	<i>Diversaj eblecoj: Vidu malsupre...</i>
vespere	7 ptm: USEJ-aferoj kun Brandon	6 ptm: ekskurso al La-Jolla por vidi la fajraĵojn		

Eblaj ekskursoj: vi elektu

Dum la venontaj tagoj ni havos multajn elektojn pri ekskursoj. Jen kelkaj proponoj ricevitaj ĝis nun:

- ★ **Salk Institute for Biological Studies**
Mondfama biologia esplorinstituto ĵus apud ni—efektive nur kelkajn paŝojn for—kun elstara arĥitekturo. Senpaga. Vizitebla lunde ĝis vendrede.
- ★ **Parko Balboa**
Vidindaĵoj abundas tie; unu NASKano diris, ke la arĥeologia *Muzeo de la Homo* estas aparte interesa. En la parko situas ankaŭ la mondfama bestoĝardeno de San-Diego.
- ★ **Urbocentro de San-Diego**
Inter aliaj eblecoj estas la histori plena kvartalo de la “malnova urbo” (*Old Town*), la ŝika kvartalo *Gaslamp* kun multaj butikoj kaj restoracioj, la haveno *Embarcadero* kun imponaj militŝipoj kaj velŝipoj kiel *USS Midway* kaj *Star of India*...
- ★ **Plaĝoj**
Tuj apud ni estas *Black’s Beach*, ŝatata de surfistoj kaj naturistoj. Por spekti la sud-Kalifornian “surfistokulturon” eble ni iru buse al la plaĝo *Mission Beach*, kie troviĝas multaj kiĉaj butiketoj kaj festemaj sunamantoj.
- ★ **Monto Soledad**
La “Soleco”-Monto estas alta je ~800 futoj (245 m). De la pinto vi vidos la urbon de La-Jolla, la marbordon, la universitaton kaj pli. Atingebla buse aŭ aŭte.
- ★ **Parko Torrey Pines**
Ĵus norden per buso #101. Bela arbara loko por piedvagi.
- ★ **Eĉ pli...** ni atendas viajn proponojn!

Kalembura kadro



La hieraŭa vorto estis “**kuk-urbo**”. (Mmm... kuko.) La divenenda vorto por hodiaŭ estas **F** _____ - _____ **O**. Helpeto: leŭ la vorto estas unike usona...

La *NASKan Faskon* redaktas via afabla helpinstruisto Hoss. Li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... aŭ ion ajn! Bonvolu sendi viajn materialojn perrete al hoss@lodestone.org> aŭ perpiede al Asante #126. Kontribuoj devos alveni antaŭ la 7-a posttagmeze por aperi en la morgaŭa numero.

Pri la nomo “Kalifornio”

En la praepokoj de la regiono kie nun troviĝas la usona ŝtato Kalifornio loĝis popolo kies nomo estis “la Kalli”. Ili ĉefe estis pacemaj, sed foje interbatalis ĝismorte kun aliaj lokaj triboj. Restas malmultaj spuroj de tiu ĉi popolo, sed esploroj indikas parencecon kun la fiĝianoj. Estas tute eble ke la unuaj Kalli-homoj alvenis el Fiĝioj al la okcidenta marbordo per grandaj kanotoj tra la oceano Pacifiko.

Kompreneble estis kelkaj grupoj de la Kalli kiuj loĝis ĉi tie, kie nun estas San-diego, kaj adoris la Sun-Diegon kies statuon ni povas vidi ĉiutage en la tereno de UCSD.

Antropologiaj kaj arĥeologiaj esploroj indikas ke la Kalli estis kanibaloj, ne surprize ĉar tiel estis la fiĝianoj ĝis la pasinta jarcento. Ili uzis homan karnon kiel ĉef-pladon, kiel ingrediencon en hom-tortoj (rimarku: ne pom-tortoj!), kaj en hakita miksaĵo kun terpomoj kaj cepoj.

La hom-tortoj estis unikaĵo de la Kalli—neniu alia konata pragraupo bakis tortojn, kun aŭ sen homa karno. Kutime temis pri la karno de mortigitaj



malamikoj, sed foje temis pri bopatrinino aŭ malbonkondata bubaĉo. (Aŭ eĉ de ĉefo kiam troaltiĝis la impostoj).

Ŝajne lertaj bakistoj, la Kalli konstruis en ĉiu vilaĝo grandan komunan bakforon, kun arka formo kaj sufiĉe grandan por komforte kuŝigi korpon aŭ tortaron. Malaperis la plejmulto de la bakfornoj, sed iuj suspektas ke la restaĵojn kelkloke oni enkonstruis en la hispanajn monaĥejojn kiuj estas famaj nun en la regiono. La arka formo iom montras al tia rilato.

La hispanoj kiuj alvenis tre rapide konsciis pri la kutimoj de la indiĝenoj. Ili baldaŭ nomis ilin la Bakfor-Kalli, por distingi ilin de alia (eble parenca) tribo kiu vivis pli norde.

Per tipa misformigo, iom post iom la nomo iĝis “la Forn-Kalli”, kaj finfine iu

anglo, ĝuste antaŭ bakiĝo, ekkriis “Ho, la Kalli-fornoj!” Kaj ek de tiam la lando nomiĝas “Kalli-fornujo”... bonvenon en Kalifornio.

Prof. Unda Miskom Preno

Ĉefo de la Arĥeologia Frako en la Univalversitato de Suda Kukurbo

Spoonerisms: Ĉu “spuneraĵoj”?

Spoonerism [spu'nerizm] estas vortludo kies nomo devenas de la pastro William Archibald SPOONER (1844–1930), kiu laŭdire ofte faris tiajn erarojn.

Ekzemple: “belanta dormulino” (anstataŭ “dormanta belulino”). Multajn angla-lingvajn spuneraĵojn oni povas trovi en la reto, ekzemple en Vikipedio. Ĉu vi povas elpensi similajn spuneraĵojn en Esperanto? (*Dankon al Mar!*)



“Vi estas Mar, kiu ŝatas margaronon, kaj vi estas Hoss, kiu manĝas horloĝojn, kaj vi estas... ho, ne. Vi estas Mar, kiu loĝas sur Marso, kaj vi estas... ho, ne. Vi estas...”